AŬSTRIA
ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung
Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Aŭstrio. — Telefono R 33-3-64

7-a jaro DECEMBRO 1952 n-ro 12

V o k o e l S t i r i o

... Wir ziel- und pflichtbewußte Esperantisten mussen unablässig darauf aus sein, unser Anliegen zu einem solchen unserer näheren und weiteren Umgebung zu machen. Wir müssen zu jeder Zeit das Abzeichen tragen, wenn wir imstande sind, uns des Esperanto zum Vorteil der Nebenmenschen zu bedienen. Wir müssen die Stellungnahme der Öffentlichkeit, der Behörden, der Presse, des Rundfunks und des Films ohne Unterlass kontrollieren und sofort belobend, berichtigend oder auch abwehrend eingreifen, wenn sich irgendwo eine Möglichkeit dazu bietet.

Wir müssen unsere Fertigkeit in der Sprache erproben und vergrößern, indem wir den Inhalt der Esperantopresse für die Presse der Heimat verarbeiten und deren Inhalt durch Esperanto der Welt zur Verfügung stellen, um unserer Heimat zu nützen. Wir müssen endlich trachten, in den Vereinen, denen wir außerdem angehören, Verständnis für unsere Sache und Lust zur Erlernung des Esperanto zu wecken, Vorträge über Dinge anzuhören, die mit Esperanto in Verbindung gebracht werden können und sollen - z.B. europäische Fragen, Sport - und sich dort zum Worte zu melden, um Irrtümern entgegen zu treten und für Esperanto zu werben. Dazu muß man freilich gerüstet sein. Daher aufmerksames Lesen der Esperantopresse und des Schrifttums in unserer Sprache. Die Kosten dieser Evidenzhaltung werden durch die nötige Begeisterung aufgebracht werden, weil diese die Kraft gibt, auf anderes, vielleicht augenblicklich Angenehmeres zu verzichten.

Das alles und noch vieles andere soll jeder Esperantist von sich aus tun, ohne auf die Arbeit eines anderen zu warten, so, als ob das Schicksal des Esperanto nur von ihm allein abhinge. Um aber alle zur Betätigung anzueifern, ist es erforderlich, daß die Landesleitung von all diesen Einzelhandlungen erfährt und ihrerseits die Hauptstelle des Verbandes in Wien mit den Berichten über unsere Tätigkeit versehen kann.

Also weg mit der Schlafmütze ! Hinein in den hellen Morgen erneuter Tatenlust mit ihren stärkenden Siegen, allzeit bereit, das Letzte zu geben, um uns unseres Meisters Dr. Zamenhof würdig zu zeigen und uns unserer esperantitischen Hochzeit nicht schämen zu müssen !

Kun samideanaj salutoj d-ro H.

(Ekstrakte el "VOKO EL STIRIO" 1/52).

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

El la protokolo de la novembra estrar-kunsido: s-ano prof. Hainschegg, Graz afable deklaris sin preta, fari la festparoladon de la Zamenhofa Festo en Vieno, kiu okazos la 20.12.52 en Postgasse 8. - S- ano Cech lastatempe denove vizitis s-anon d-ron Dworschak por informi lin pri la Esperantaj aferoj. - S-ano prof. d- ro Görlich, Vieno, estis distingata per la ordeno de "Kavaliro de la Sankta Tombo" . - Rilate al la kontraŭ-Esperanta artikolo en la ĵurnalo "Neues Österreich" prof. d-ro Sirk estis komisiata, verki respondartikolon. - Kasistino s-anino Loibel detale raportis pri la kasostato,kiu daŭre restas nekontentiga. La saldo estis S 496.61 kaj post la pago de la novembra AERevuo restos nur sumeto en la kaso. - S - ano Jeitler proponis, je en la Klagenfurta AEKongreso estu parolate pri la temo " Esperanto en la sindikatojn ". La afergvidanto, s-ro Cech, raportis, ke la IKK-ano s-ano Schmidt el Klagenfurt traktis kun li la antaŭlaborojn por la kongreso 1953,kiu okazos de l'22a-24a de julio.- La landestro de Karintio kaj la urbestro de Klagenfurt promesis oficialen subtenon. La 24.7. okazos en la kadro de la kongreso la jarkunveno de AEF. Kongreskotizo estos S 15.- kaj por familiano S 8.-

Esperanto en popolaj altlernejoj. Niaj aktivaj kun-

laborantoj sukcesis ree interesi la estrarojn de popolaj klerigaj institucioj pri aranĝo de E-kursoj. La AEF-estraro dankas siajn fervorajn anojn kaj invitas niajn aktivulojn, jam nun entrepreni ĉion, por ke jam en la printempa aŭ minimume en la venanta vintra instrusezono grave plimultiĝu la nombro de tiaj kursoj. Kursoj estas aranĝataj en Innsbruck (d-ro Karner), Wels (E.Moser)Hohenberg (F.Lampl). En Vieno la popolkleriga instituto Alsergrund proponis al la E-grupoj "Kalocsay"- "Laboro" por aŭtuno 1953 la okazigon de elementa E-kurso. Ni povas informi, ke la Svisa E-Societo invitis la aŭstriajn E-grupon al partopreno de "koordinataj" E-kursoj en tiaj institutoj. Interesatoj bv. postuli ĉi-koncernajn informojn. S- ano Reiter komunikis, ke kurso tia nun okazas kun 10 partoprenantoj en la popola altlernejo de Salzburg, gvidate de s-ano Kaps.

Sendante 2 respondkuponojn, ĉiu interesito povas ricevi ekzempleron de la "Kongresnumero de Norvega Esperantisto" pri la 37a Univ. Kongreso de E. en Oslo. Skribu al "Eldonejo Esperanto A/S, Boks 942, Oslo". La kongreson laŭ definitiva statistiko partoprenis 1.614 personoj el 34 landoj.

La urbestro de Vieno subvencias AEF. Präsidialbüro de la urbestro de Vieno informis la E-Centron, ke la urbstro de Vieno, s-ano Franz J o n a s , konsidere al la signifo de nia organizo konsentis subvencii ĝin per sumo de 1.000 Ŝilingoj. La estraro de AEF esprimas al nia estimata samideana urbestro la dankon de la aŭstria Esperantistaro pro lia akcelado de niaj organizo kaj movado.

Aŭstria Esperanto-Kongreso 1953 en Klagenfurt. Kiel jam menciite sub la rubriko "protokolo de la estrarkunsido", la preparlaboroj de la komitato bone progresas kaj la landaj kaj urbaj aŭtoritatoj favoras ĝian agadon. Ni ree sciigas, ke nia kongreso, okazonta la 22.-24.7.53 , estas samtempe "Internacia Esperantista Renkonto" por la eksterlandaj ges-anoj, kiuj veturos al la 38a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb, Jugoslavio, (25.7.-1.8.) Aliĝojn por nia venontjara AEKongreso direktu al la sekret., s-ro Karl Dürrschmid, Klagenfurt, Sternallee 5.

Aliĝemuloj al la 38a Univ. Kongreso de E. en Zagreb turnu sin kun respondafranko al s-ro magistro Franz Höfert, 14., Penzingerstr. 121. Vi profitos favoran tarifon, anon-

cante vin jam nun. La aliĝiloj devas esti limdate je la 30.6. en Zagreb. Kiel nunjahre en Oslo, la Zagreba LKK ne akceptos malfruajn aliĝojn. Aranĝantoj de karavanoj bv. skribi al LKK por ricevi detalojn kaj instrukciojn de kunlaboro. Adreso: 38a Univ. Kongreso de E., poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavio.

AŬSTRIA ESPERANTO-KRONIKO

SALZBURG: S-ano Heinrich Reiter raportis al la Centro, ke la grupo "Verda Stelo" aranĝas Zamenhof-feston la 13.12. en "Nigra Ĉevaleto" kaj "Estonteco" okazigos Kristnask -kaj Zamenhof-feston en Borromäum. Oni atendas grandan partoprenon, precipe ankaŭ de ne-esperantistoj. Pri la E-kurso en popola altlernejo Salzburg ni informis jam aliloke. Gratulon al la entreprenemaj geamikoj en Salzburg !

STIRIO per sia "Voko el Stirio" komunikas Zamenhof - feston en Graz, Steierm. Weinstube, la 12.12. La 4 a Stiria E-Tago, pri kiu ni jam raportis lastnumere, enhavis "Stirian Esperanto-Konferencon", dum kiu estis unuanime akceptataj tri rezoluciuj. Unu estis direktata al la Aŭstria Instru-Ministerio kaj, akcentante la pacspiriton de E., pledis por la enkonduko de E. kiel deve lernata unua fremdlingvo en ĉiujn lernejojn. Dua direktis sin al la stiria gazetaro, petante pri akcelado de nia lingvo, "ĉar la plej alta el ĉiuj teraj havaĵoj, la tutmonda paco, postulas nuntempe la ekskluzivan atenton de la registaroj, sed ankaŭ la aktivan partoprenon de la popoloj mem, tio signifas, de la multaj unuopuloj...... Necesas la interna preteco por la reciproka kompreno. Malhelpaĵo ekzistas per la diverseco de la lingvoj. Tiun malbonstaton la internacia lingvo Esperanto klopodas forigi kaj ĝi faras tion kun kreskanta sukceso. Konforme al sia interna karaktero ĝi volas helpi, ke la homo en la aliulo ekkonu la homon kaj ke la naturdevenaj kontraŭecoj almenaŭ parte estu mildigataj ...". La tria rezolucio adresas sin al la Aŭstria E-Instituto, al kiu estas rekomendite, krei kun la Internacia E-Muzeo en Vieno la projektitan Aŭstrian E - Antologion.

Knittelfeld: La instruado de E. en la tiea ĉeflernejo por knaboj nun oficiala kaj ŝtate salajrata.

Distrikta inspektoro de lernejoj Max Dienes kaj la di - rektoro de la ĉeflernejo Hermann Wakonig tre favoris la tiurilatajn iniciatojn de AEF -landestro d -ro Halbedl kaj nun mem lernas E. lau la kurso de d-ro Grimme en " Die Frau ". La instanco por la lokaj lernejoj laŭ propono de d-ro Halbedl decidis ankaŭ, dediĉi por la korespondado de la knaboj en E. en la nuna jaro la sumon de S 120. La ĉeflernejo ekspozas nun multajn infandesegnaĵojn el Japanio, kiujn la knaboj ricevis, sendinte desegnaĵojn dum printempo laŭ sugesto de sia instruisto (d-ro Halb - edl). - La klubo "Verda Stelo" akceptis la karan gaston de la aŭstriaj E- istoj, s-anon Frank Halls el Melbourne, kiu ravis la ges-anojn per sia agrabla, modesta persono kaj ĝojigis per siaj priaŭstraliaj filmoj kaj rakontoj.

E-rondoj Alois Postl, Au kaj Turnau. S - ano Postl gvidas kurson en la lernejo de Turnau kun 11 geknaboj kaj unu kurson en Au por kelkaj ministoj. Ni havas la plezuran okazon, gratuli al li same pro lia sukcesa pionira agado kiel pro la ĝojiga familia okazaĵo : pri la antaŭ nelonge al li naskita fileto, kiun li nomis "Esperno". Koran bondeziron al la verdstelaj gepatroj !

Nekrologo . Meze de oktobro mortis en Graz nia malnova samideano d-ro Ludwig KASPAR, Oberlandesgerichts - rat e.p., Wörschach a-/Enns. Honoron al lia memoro !

Abonprezo por "VOKO EL STIRIO": ĉiu kajero S 2.-- , por la tuta jaro (5-6 kajeroj) S 10.--. Redakcio:Josef Eder, Stattegg - Eichberg, Poŝto-St.Veit, Stirio.

VIENO: E-Societo "Danubio" estis vizitata de s-ano Oskar P o p p e r , kunfondinto kaj multjara "Danubi-ano" kiu nun domicilas en Milwaukee, Usono. Li edziĝis en Vieno al s-ino Lisa Bartl. La estraro de AEF kaj la E-societo Danubio direktas al li kaj lia edzino siajn korajn bon - dezirojn ! - La AEF-grupo "Suno" kunvenas kun la ges-anoj el Floridsdorf, Kagran, Hirschstetten, Aspern,Kaisermüh - len kaj ĉirkaŭaĵo ĉiun unuan mardon de l'monato je la 19a horo en gastejo Partik, Vieno-Kagran, Donaufelder - straße 263. Gastoj estas kore invitataj ! - Naturamika Fakgrupo. Dum la Naturamika Tago la Viena grupo aktive partoprenis. Ariĝinte ĉirkau la ruĝa flago kun la verda stelo, la gek--doj demonstris por la vera internacieco de la asocio. Niaj amikoj en la ĉirkaŭo de Wallber-

gerhütte faris efikan atentigon por la ideo de la internacia lingvo.-Estro Max Finkenzeller verkis vintrosportan terminaron. Kurso kun 10 anoj ekfunkciis : marde, 19a, 15., Diefenbachg. 36 ! - Grupo "Libereco" kunvenadas regule ĉiun merkredon je 19 a en SPÖ - Heim, 12., Lengenfeldergasse. Leteradreso : W. Pachmann, Am Fuchsenfeld 10-15, Vieno XII. - E-grupoj "Kalocsay" - Laboro" la 29.11. pro la 80 jariĝo de sia membro s-ano Carl Gasperini okazigis en Volksbildungshaus Alsergrund en kuneco kun la AKIE-grupo de Vieno festan koncerton. La aranĝo , partoprenita de arego de Vienaj ges-anoj , ofertis al nia kara samideano Gasperini muzikaĵoin, prezentitajn de prof . Mizzi Mick-Sellyey (harpo), operkantistino Stefanie Holeschovsky (kun fortepiana akompano de s-anino Hermine Peschl) kaj de kvarteto de kordinstrumentoj. Naŭ alparoloj, du kun poemoj, kaj tableto kun donacoj montris al nia honorinda samideano dum tiu familia vespero, kian estimon kaj amon li posedas inter ni.

Vienaj gesamideanoj, a t e n t u !

La Z A M E N H O F A F E S T O okazos sabate, la 20.12.52 je la 18.30 h en la festsalonoj de General-Postdirektion,I.,Postg.8 Venu multnombre! V.E.D.

TIROIO : Post la morto de nia honorinda s-ano d-ro Blaas la lektorato ĉe la universitato de Innsbruck vakis. Nun, ĝojinde, la ministerio por instruado enoficigis s- anon Hermann OELBERG por tiu gravega E-funkcio . Al li dankon kaj koran gratulon !

K o r a j n s a l u t o j n
k a j b o n d e z i r o j n
POR KRISTNASKO KAJ LA NOVA JARO
direktas al ĉiuj geesperantistoj en Aŭstrio kaj la tuta mondo

LA ESTRARO DE AEF.

Fondiĝos AŬSTRIA SOCIALISTA LIGO ESPERANTISTA.

La socialistaj E-istoj ĝis nun grupiĝis en AEF sub la nomo "Socialista Esperantistaro Aŭstria", ne havante propran societan statuton. Tial en la kunveno de 22.7.52 la ĉeestantoj ĉiuvoĉe decidis aliigi la nuntepan societnomon je "Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)kaj starigi la unuĝon fundamente de propra statuto. Tiamani - ere la novfondota organizo sekvos la tradicion de nia malnova kaj en 1934 likvidita A.L.L.E.. La statutprojekto estis transdonata al la partiestraro de la Socialista Partio por prijuĝo, ĉar ASLE celas akiri la karakteron de kultura parti-organizo, por ricevi en la poresperanta agado pli multe da oficiala partia subteno. Post la leĝa aprobo de la statuto la fondkunveno de ASLE povos okazi en januaro 1952. Tiurilata informo sekvos ĝustatempe en AER aŭ per specialaj invitiloj.

En la menciita kunveno estis substrekate,ke la fondo de ASLE ne signifos, ke la socialistaj E-istoj eble intencas eksiĝi el AEF - male: ASLE restos fidela al la E-tutorganizo. aŭstria kaj subtenos AEF ĉiuforte en la aferoj de la ĝenerala E-movado.

Ĉiuj iamaj socialistaj ALLE-anoj,kiuj ĝis nun staris flanke de la E-movado, estas alvokataj, aliĝi al ASLE kaj aktive aŭ subtene kunlabori nia socialista E-organizo.

Alfred Berdan, afergv.estro .

Eksterlandaj delegitoj Esperantistaj de la Kongreso de l' Popoloj por la Paco parolos kaj diskutos en la aranĝo de la E-ista Iniciata Komitato por la preparo de la E-propagando dum la menciita kongreso lunde, la 15.12.52 je 19³⁰ en la E-Centro, Vieno 15., Fünfhausgasse 16.

Jubilea SAT-Kongreso en Düsseldorf-Germanio.

Ĉerpante el "La Ponto", Germanio,kaj "Boletin", Hispanio, ni povas komuniki pri tiu kongreso jenajn sciindaĵojn: Aliĝis 760 membroj el 16 landoj, sed partoprenis 622 el 11 landoj. Kiel kongresejo funkciis la impona konstruaĵo"Rheinhalle". En la Solena Malfermo la urbestro de Düsseldorf diris : "La homaro de nia jarcento devis fari multajn oferojn por ekkoni, ke ekzistas pli multe da tio,

kio unuigas ol da tio, kio disigas. "Granda nombro da prelegoj karakterizis tiun ĉi Jubilean Kongreson.Pri ili la ĉeestintoj kunportis hejmen interesajn notojn kaj ideojn. Sekvis en varia ciklo k-doj Varingien, Parizo,pri " kion nekredanto povas trovi en la Biblio",k-do Laurat, Parizo, pri "de liberala al organizita kapitalismo" (Ŝuman-plano), k-do Mark Starr, Novjorko, pri "komparoj inter la usona, kaj eúropa laborista movadoj", k-do Bertelmes pri "Henriko Heine, sennacieca poeto kaj profeto",k-do Jacobsen,Arhu - zo, pri "Dana Laborista Kleriga Asocio" kaj k-do v.d. Starre,Ijmuiden, pri la idealo de Bellamy". Ekster tiuj ĝeneralaj prelegoj d-ro Nölle, Koblenco, prezentis al la simpatiantoj de la Gezel-teorio la temon "milito kaj valuto". K-do Vita, Parizo, enkondukis temon pri militfaktoroj kaj rezisto al la milito, kiu provokis viglan opiniinterŝanĝon; ankaŭ al pluraj el la antaŭe nomitaj prelegoj okazis kritikoj kaj demandoj, pri kiuj respondis la parolintoj. - Al la TANEF -kunsido (naturamikoj) ĉeestis 60 gek-doj el multaj landoj.

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo"-. Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nummer 16
Druck: Offset Vervielfältigungen, ADRESSEN-SUPPAN Wien IV., Brucknerstrasse 2, U 41-2-70